

Heinrich Heine,  
 En nord' unu pino  
*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En nord' unu pino en solo  
 Dormetas sur nuda altaĵo;  
 Glacia kaj neĝa tavolo  
 Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,  
 En unu dezert' orienta,  
 Eterne pri lando alia  
 Malgaje sopiras silenta.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*

Heinrich Heine,  
 Ein Fichtenbaum steht einsam

Ein Fichtenbaum steht einsam  
 Im Norden auf kahler Höh';  
 Ihn schläfert; mit weißer Decke  
 Umhüllen ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,  
 Die fern im Morgenland  
 Einsam und schweigend trauert  
 Auf brennender Felsenwand.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-1023-2072 (2014-05-23 14:24:32)*

*La poemo troviĝas interalie en <http://www.heinrich-heine.net/haupt.htm>.*